EKE esperanto

**Kunveno: merkredon la 15an de majo 2024a**
**je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,**
**Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.**
**tel. 040-2450590.**

# Rakontu al ni

La programon prizorgos: *Rob*.



Por tiu ĉi programo mi estas inspirita de diversaj rakontoj el la reto. Abundas en la reto rakontoj pri personoj kiuj nepre volas ĉiam havi laŭ sia volo (en Usono oni ofte nomas tiujn per la nomo *Karen*); ĝenerale tiuj iel ricevas laŭ sia merito. Aŭ rakontoj pri personoj kiuj faras stultan ordonon, kaj insistas pri la obeo (kaj sekve iu tiam ekas *malican obeon*, kiu havas alian efikon ol la ordoninto pensis). Rakontoj pri familiaj rilatoj, kaj efikoj pro agoj (ĉu kun bona, ĉu kun malbona efiko). La eblecoj abundas. Eble ni eĉ povas ion lerni el iuj rakontoj...

Mi petas ke vi ĉiuj preparu iun rakonton por la sekva kunveno (aŭ eĉ pli ol unu, depende de la longeco aŭ de via emo). La rakontoj povas esti longaj aŭ mallongaj; realaj aŭ fikciaj; el via propra ĉirkaŭaĵo, el la reto aŭ el libro; eble vi eĉ ne scias certe ĉu iu rakonto estas reala aŭ ne.